# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo decembro 2025**


## ZAMENHOF-TAGO 2025, VENU ANKAŬ VI!

Kiel tradicie dum ĉiuj jaroj, denove en 2025 la madridregionaj samideanoj festos la Zamenhofan Tagon. La festo okazos du tagojn antaŭ la oficiala datreveno, nome la sabaton 13-an de decembro. Ni komenciĝos je la 11,00 horo, kaj planas fini ĉ. la 18,00 horo.

La loko ĉijare estos denove la urbo Fuenlabrado, konkrete la sidejo de la Fuenlabrada Esperanto-Ligo, tre facile alirebla el la ĉefurbo aŭ aliaj madridaj urboj, ĉar ĝi troviĝas je 300 m. de la haltejo “Fuenlabrada Central” de RENFE kaj metroo. Ĝi lokiĝas ene de la C.E.P.A. “Paulo Freire” kiu konsistas el kvin konstruaĵoj. Oni devas eniri ĉe Av. de las Naciones, tra la pasejo por aŭtoj kondukanta al interna parkejo (adreso per Google Maps: https://maps.app.goo.gl/wcgZRa54bsvncX2y6). Kaze ke vi ne scias kiel alveni, denove ĉijare grupo da partoprenantoj renkontiĝos ĉe la enirejo de la fervoja haltejo je la 10,45.

Ni ĝuos ampleksan prelegaron. Jam anonciĝis prelegoj interalie de Pedro Hernández kaj Toño del Barrio. Alvenos instruisto de la C.E.P.A. por rakonti al ni pri la loko. Ni certe havos prezentadon de libroj, ĉar dum la lasta jaro estis pluraj tre interesaj novaj eldonoj, kaj specife ni atentigos pri la traduko de la novelo de Ramón J. Sender, “Rekviemo por hispana kamparano”, kiu ĵus aperis ĉe Mondial; diversajn ekzemplerojn ni disponos surloke por eventuala aĉetado. Estos ĝenerala libroservo, kaj ni ankaŭ povos ĝui ludojn zorge de Juan del Castillo.

Ni havos komunan manĝadon, por tiuj kiuj pretas resti je tiu horo, en proksima restoracio. Se vi interesiĝas, ATENTU, ni bezonas scii kiom da homoj venos por la tagmanĝo, kiom eble plej frue kaj ĉiukaze ĝis la 10-a de decembro. Se vi volas partopreni la tagmanĝon, sendu mesaĝon al esperantoesdetodos@gmail.com. Kompreneble, por ĉeesti la feston ne necesas antaŭanonciĝi.

Interese estos ankaŭ ke ni esperas ricevi viziton de ĵurnalisto, kiu pretigas raporton pri Esperanto en grava tutlanda ĵurnalo, kun fotografiisto. Venu, ne nur por plenigi la salonon, sed ĉefe por ĝui la esperantan kulturon.

Pliajn detalojn bv. legi en https://eventaservo.org/e/826d91 kaj baldaŭ en la retejo de MEL.

## SUKCESIS LA LIBROPREZENTOJ NOVEMBRAJ

Kiel anoncite, la lundon 17-an de novembro okazis libroprezentado en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, de “Gadir”, nova poemaro, dulingva en la hispana kaj Esperanto, de Jorge Camacho, kun enkonduko kaj kunprezentado de Ana Manero.







La 6-an la librejo IN-VERSO gastigis novan prezenton de la trilingva poemaro “Poesía luz me urge / Poezio lumo al mi urĝas / Urge-me poesia luz” de Armando Silles McLaney.

Kaj fine la 24-an de novembro Ana Manero prezentis sian dulingvan libron pri Maruja Mallo en la kultura spaco “Marx Madera”, kun kontentiga ĉeesto de interesatoj (vidu apudan foton).

## VIZITIS NIN KAJ VIZITIS NI

La lundon 24-an de novembro vizitis la sidejon la konata usona aktivulo, loĝanta en la valencia regiono, Dennis Keefe. Li parolis pri Ĉinio, kaj poste li gvidis distancan kurson por la londona klubo, kiun madridaj surlokaj ĉeestantoj povis partopreni.

Du madridaj esperantistoj, Darío kaj Alex, partoprenis la Ĉinan Kongreson de Esperanto en Taiyuan (provinco Shanxi), komence de novembro.

## VIRTUALA KONGRESO DE UEA

Dum la unua semajnfino de decembro okazos Virtuala Kongreso organizata de Universala Esperanto-Asocio. Pri ĝia organizado ĉefzorgas loĝanto en madrida regiono, Albert Garrido.

Vi povas vidi ĉiujn detalojn, inklude de programo en https://vk.esperanto.net/2025/. Aliĝis je la fino de novembro pli ol 1 200 homoj, el kiuj 61 anoncis sin el Hispanio.

## PLIAJ INFORMOJ KAJ KONTAKTOJ




Ni memorigas ke ni renkontiĝas ĉiujn lundojn en la sidejo, ekde la 18,30 horo, por babili kaj praktiki Esperanton. Notu tamen ke pro la pluraj decembraj festoj, ni ne povos certigi malfermon ĉiujn lundojn, do bv. antaŭe interkonsenti.

Ĉimonate ne okazos unuasabata renkontiĝo, pro la festado de la Zamenhofa Tago en la dua sabato.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Vi povas trovi nin ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com